

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Leandro Abrahão

Gong Xiaofeng

Mireille Grosjean

Aranka Laslo

Stefan MacGill

Reginald Moreels

Radojica Petrović

Germain Pirlot



ENHAVO

Enkonduko: <i>Komento pri la 48-a ILEI-Konferenco</i> (Mireille GROSJEAN):.....	3
Simpozio kadre de la 48-a Konf.: <i>Prelego de D-ro Reginald MOREELS</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Granda paco post grandaj militoj</i> (enkonduka prelego)	12
Radojica PETROVIĆ: <i>Post la 48-a Konferenco de ILEI</i>	19
Mireille GROSJEAN: <i>Nia eks-prezidanto Mauro La Torre</i>	26
Stefan MACGILL: <i>AMO 'Ege(re)' progresas</i>	27
Stefan MACGILL: <i>UEA kaj Kapabligo: rekomendoj kaj rimedoj finfine kunigitaj</i>	27
M. GROSJEAN: <i>Brila skipo parolis al atentema publiko (pri la maja kolokvo)</i>	29
<i>Paĝo por tiuj el ni, kiuj loĝas en EŬROPO (letero de Germain PIRLOT)</i>	31
Aranka LASLO: <i>E-fakrondo en la politeknika lernejo, Subotica (Serbio)</i>	32
Leandro ABRAHÃO: <i>Raporto pri la „Projekto Stelo” (Brazilo)</i>	36
GONG Xiaofeng: <i>Kapulino de la belga konsulejo en Beijing eklernas E-on</i>	38
<i>En la betulurbo pri aktualaj evoluvojoj de lernado</i> (Radojica PETROVIĆ)	39
<i>Informoj pri ILEI</i>	41
<i>Redakciaj informoj</i>	42

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Rezentado de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.

Sekretario: Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com> Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.

Vicsekr.: Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. E-centroj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053.<radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Konferencoj, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.

Estrarano: Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: *Sukcesa Konferenco de ILEI
en Oostende kun 150 partoprenantoj*

Dorskovrile: *David Astori estas
premiita; Pluvombrelo sur suna placo
(el CN); Franda vespero (tablo
preparita de Monika Molnár); Konkoj
(nia donaco al la domo De Ploate)*

Enkonduko

Komento pri la 48-a ILEI-Konferenco

„Grandan pacon post grandaj militoj” estis nia konferenca temo. La estraro voĉdonis pri tiu konferenca temo kaj aprobis ĝin. Leviĝis la demando, kiel kongruas tia temo kun instruado?

Rigardu mapon de Eŭropo kaj esploru pri Belgio kaj Oostende. Tie gekolegoj pretis akcepti nin. Do ni iris al Oostende kaj la LKK organizis ĉion, inter aliaj eventoj ekskursojn. Okaze de tiuj ekskursoj kaj en la urbo mem vidiĝas kaj sentiĝas la eventoj kaj/aŭ la restaĵoj de la du mondmilitoj. Jam antaŭ tiu Konferenco en Oostende venis stimuloj de du kolegoj, Mihai Trifoî kaj Ron Glossop, ke ni, ĉiuj ni instruistoj, ni ILEI, ni e-istoj, laboru por edukado al paco. Ilia alvoko aperis en IPR 2014/3 kaj 2015/1. Jam la verkintoj de la statuto de ILEI iris en tiu direkto:

3.1 Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.

3.2 Progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.

Laŭ tio aperis en la programo diversaj prelegoj en rilato kun tiu temo kaj montriĝis la valora okazo aŭskulti prelegon de d-ro Reginald Moreels, iama prezidanto de „Kuracistoj Sen Limoj” kaj eks-ministro belga, kiu mem spertis militojn flegante vunditojn. [Legu lian prelegon en paĝoj 4-11.]

Konferenco certe estas okazo plilertiĝi profesie, en la fako instruado. Se la Konferenco plie alportas historiajn konojn kaj pripensajn stimulojn, tio estas pozitiva fakto. Ĉu ni devas koncentriĝi pri gramatikaĵoj aŭ malfermi la okulojn al la mondo esplorante pri vojoj al paco? Bonvolu pripensi.

Laŭ mi: Ĉiumaniere la studentoj perceptas ion de sia instruisto, ĉu egoismon, ĉu malfermitecon al la mondo, eĉ se la instruisto volas transdoni nenion ĉirilate. Instruistoj estas en ŝlosila pozicio por alporti paŝetojn al paco: „eĉ guto malgranda...”

Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI

Simpozio kadre de la 48-a ILEI-Konferenco. Oostende, Belgio, julio 2015

Prelego de D-ro Reginald Moreels

(el registrado)

Mallonga biografio



D-ro Reginald MOREELS estas belga kuracisto kun kirurgia specialiĝo.

De 1982 ĝis 1995 li laboris kiel kirurgo en Ostendo kaj estis samtempe membro de la internacia, neŭtrala medicina helporganizo „Kuracistoj sen Limoj”, kiu aktivis en 88 landoj kaj kiu helpas homojn dum militaj konfliktoj kaj post naturkatastrofoj. De 1986 ĝis 1994 li estis ĝia prezidanto. Dum tiu ĉi periodo li aktivis ankaŭ kiel kirurgo en pluraj tropikaj landoj kaj en eŭropaj landoj kun medicinaj problemoj (Angolo, Etiopio, Liberio, Rumanio kaj pluraj aliaj landoj). Li entreprenis plurajn diplomatiajn kaj kirurgiajn misiojn al landoj en milito kaj al

teritorioj trafitaj de naturkatastrofoj.

De 1995 ĝis 1999 li estis belga ŝtatestretario por kunlaboro kun evolulandoj; en 1999 li estis belga ministro pri internacia kunlaboro kaj de 1999 ĝis 2000 li estis belga senatano kaj samtempe membro de la parlamenta komisiono por homaj rajtoj, rifuĝintoj kaj azilpetantoj de la Konsilio de Eŭropo.


De 2008 ĝis 2013 li estis sendito de la belga ministerio de eksteraj rilatoj al la regiono de la Grandaj Lagoj en Afriko por kontribui al pacplano kaj por helpi al la tieaj homoj.

El la ĉi-supre menciita agado montriĝas klare, ke d-ro Moreels volas kontribui al la kreo kaj konservado de la paco ie ajn en la mondo kaj doni al la homoj homan vivon. Li estas aŭtoro de pluraj libroj kaj artikoloj pri milita kirurgio, humana diplomatio kaj politiko de migrado kaj demokratigo.

Prelego

Mi ŝatus prezenti al vi iom el miaj pripensoj surbaze de miaj spertoj, ĉar mi ankoraŭ nun laboras, iras al eksterlando. Antaŭ kelkaj semajnoj mi estis en orienta Kongo kaj operaciis. Mi baldaŭ reiros al Burkino, Benino kaj al orienta Kongo. Ĉiuj tiuj konfliktoj pripensigis min ekde longa tempo pri la problemo de perforto: kiel eblas, ke homoj uzas tiom da perforto. Mi volas lige kun tio omaĝi al la E-movado. Jam la decido eklerni la lingvon estas grava paŝo; plie vi konsideras la homon kiel mondanon kaj ne kiel membron de nacio, tribo aŭ etno. Mi ĵus restadis en Sirio, Irako kaj Pakistano, kaj vidis mem ĉion, kion kruela homo povas fari al alia homo. Mi ne fariĝas pli pesimisma pri la homo ĝenerale sed pli realisma ol mi estis en mia junaĝo. La idealismo restas sendepende de la biologia aĝo, tamen oni evoluas.

Mi nun volas reiri al homo antaŭ 17 jarcentoj: Sankta Aŭgusteno, ĉu vi konas lin?¹ Mi ne konas ĉiujn liajn verkojn, sed mi trovis tekston, kie li montras, kiel homoj povas uzi perforton. Li pripensis, ĉu ekzistas justa perforto? Mi transprenos liajn pensojn al la nuna jarcento. Por helpi al vi flari la etoson, mi nun montros kelkajn fotojn de kirurgarto. Se iu ne volas vidi tion, tiu povas kovri al si la vizaĝon. Unue vi vidos pri planebla kirurgio, kiu



¹ https://eo.wikipedia.org/wiki/A%C5%ADgusteno_de_Hipono (portreto fare de Sandro Botticelli)

rilatas al paca situacio; tio ne similas al milittempa kirurgio en landoj kun konfliktoj. Tiu milittempa kirurgio estas aparta fako ene de la kirurgarto.

(Moreels montras fotojn el sia laboro en diversaj landoj).

Kelkaj memoraĵoj restas en mia memoro, mi ne povas forgesi. Ekzemple en Kamboĝo mi devis amputi infanon fortranĉante la du kruojn pro vundo de ter-mino. Tiu knabo metis piedon sur mino, kiam li revenis el la lernejo je la kvara horo posttagmeze. Mi ne povas rakonti per vortoj, mi povas nur montri bildojn. Mi tiom malamas tiujn aĉajn ter-minojn, kiuj restas dum jarcentoj; meti tian minon daŭras unu minuton. Se ni nun ĉesus meti tiajn minojn, ni bezonus 250 jarojn por purigi la planedon. Kiam temas pri ostorompiĝoj, oni kutimas fiksi la membron per eksteraj teniloj, metalaj. Se estas vundo per kuglo, ĉiam estas enirtruo kaj elirtruo kaj tiujn du truojn oni devas trovi.

En Somalio en 1993 estis armitaj bandoj, kiuj provis protekti nin. Ili postulis monon por fari tion. Mi flegis junan viron, kiu ricevis pafon, kuglon. Post semajno mi revidis lin en lia soldata aktivado kaj tio pensigis min: al kio utilas mia agado? La problemo plie rilatas al internacia juro. Sciu, ke „Kuracistoj sen limoj” estas sendependa institucio, ne ligita al Ŝtatoj. Male CICR, la Ruĝa Kruco, dependas de la Ŝtatoj. Siatempe militoj okazis inter Ŝtatoj. La origino de la nunaj konfliktoj estas en la jaroj 1970, 1980, kiam ekzistis kontraŭaj movadoj en diversaj Ŝtatoj, liberigaj movadoj, kiuj luktis kontraŭ la registaroj. Post la dua mondmilito la konfliktoj naskiĝis ene de la Ŝtatoj. Ekzemple en Angolo, Mozambiko, Salvadoro, Nikaragvo.

En Angolo la urbo Kuito estis sieĝita de unu atakgrupo dum 10 monatoj. Kiel unuaj ni eniris en la urbon. Estis diversaj bezonoj: vakcini... La hospitalo estis ekster la regata zono. Ni devis iri al la domoj preni tie la vunditojn. La unuan operacion mi faris en detruita banko, sur banka tablo. Poste ni uzis alian bankon por operacii. Estas nun esploro por forpreni la ter-minojn. Estas interesa agado de belgo, el Flandrio, kiu malkovris, ke ratoj kapablas trovi la minojn. Nun oni uzas ratojn.

Nun ni iru al mia pripenso:

Perforto apartenas al ĉiuj epokoj. Homo kapablas fari bonon kaj malbonon. El inter ĉiuj estaĵoj la homo estas la sola, kiu kapablas fari malbonon kun intenco. Besto batalas por trovi nutraĵon, batalas por konservi sian teritorion, volas protekti sian familion. Tamen homo povas senkiale agi perforte. Tio komenciĝis en la epoko de Kaino kaj Habelo (el la Biblio). Unu estis

bredisto, la alia agrikulturisto. Habelo la bredisto povis oferi bestojn al Dio. Kaino povis doni cerealaĵojn. Dio ne akceptis cerealaĵojn (mi ne scias kial, temas pri legendo...) kaj tio igis Kainon ĵaluza, kaj tio estas la kaŭzo, pro kiu Kaino mortigis Habelon. Religioj ofte estis pretekstoj por militoj. Kristanoj, nun islamanoj, ankaŭ hinduoj... Diversaj militoj havis tiun pretekston, sed la vera intenco estis provo akiri novan teritorion. Ekz. en la Biblio la landon Kanaano; tio estas Palestino. Ĉiuj volis konkeri la urbon Jerusalemo. Tiu lukto en tiu regiono estas terura. Antaŭ nelonge mi estis tie, tiu lando fariĝis lando de bariloj. Aŭgusteno provis intelekto esplori pri la kialoj de militoj. Li provis raciigi la perforton. Kompreneble Aŭgusteno kaj liaj posteuloj estas kontraŭuloj de perforto. Li ne prezentis justan militon, gravas diri tion.

Poste venis Tomaso de Akvino² en la 13-a jarcento kaj Hugo Grotius en la 17-a jarcento³, kiuj esploris, kial iu povas lanĉi militon. La perforto devas esti la lasta rimedo. Nun mi parolas el mia 30-jara sperto kiel kirurgo. Aŭgusteno argumentis, ke la milito devas esti pravigita por protekti civitanojn kontraŭ atakoj, por denove validigi la rajtojn de la civitanoj aŭ por reinstali justan politikon kaj justan Ŝtaton. Do neniam milito povas komenciĝi por akiri novan teritorion aŭ pro ekonomiaj kialoj, kiel tio ofte okazas nuntempe. Do nuntempe ni parolas pri sindefendo, memdefendado. Ofte Ŝtatoj uzas tiun vorton ne ĉiam por vere sin defendi. Ekzemplo estas invado de Ugando fare de Tanzanio, kie Nyerere⁴ forpuŝis Idi Amin Dada⁵; li kontribuis al remeto de demokratio, tamen poste la reĝimo fariĝis kruela. Alia situacio estis en orienta Pakistano en 1970, kiam islamaj pakistananoj abunde masakris bengalajn homojn, kaj elmigris 10 milionoj da bengalaj homoj al Barato. Barato ne povis akcepti tiom da rifuĝintoj; pro tio ĝi kreis en tiu regiono novan landon Bangladeŝo. Alia estas Vjetnamio kaj Kamboĝo: ĉiuj kunlaborantoj de la hospitaloj, kie mi operaciis plurfoje, perdis parencon dum la genocido en la jaroj 1975 ĝis 1979. Antaŭ 1975 okazis la terura reĝimo de Lon Nol⁶, dume neniu reagis. Kiam Vjetnamio invadis Kamboĝon en 1979, tiam la tuta mondo protestis. Estas giganta hipokriteco: iam la registaroj kaj la internaciaj organizaĵoj reagis, iam ne; mi membris en tiaj organizaĵoj, mi povis konstati tion. Rusoj kun la preteksto de sindefendo

² https://eo.wikipedia.org/wiki/Tomaso_de_Akvino

³ https://eo.wikipedia.org/wiki/Hugo_Grotius

⁴ https://eo.wikipedia.org/wiki/Julius_Nyerere

⁵ https://eo.wikipedia.org/wiki/Idi_Amin

⁶ https://eo.wikipedia.org/wiki/Pol_Pot

invadis Afganion kaj Usono invadis Irakon pretekstante la ekziston de potencaj armiloj.

Usonanoj kaj Britoj faras diferencon inter *preventive war* kaj *preemptive war*. Okaze de *preemptive war* (antaŭdefenda milito), iu atakas por eviti, ke la alia ataku. En *preventive war* (preventita milito), oni supozas, ke venos atako kaj pro tio oni atakas, detruante la armilojn de la alia. La invado de Irako estis *preemptive war*. Do pensante tiel, oni povas pravigi atakon al diktaturo, tamen atako al Irako kun multe da nafto estas pli interesa ol atako al Burundo...

Laŭ Aŭgusteno nur legitima instanco rajtas deklari militon. Do Ŝtato deklaris militon al alia Ŝtato. Nuntempe oni diras, ke la milito povas komenciĝi nur post voĉdono de la Konsilio de Sekureco de UN kaj eventuale laŭ rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UN. La Konsilio de Sekureco ne evoluis ekde 70 jaroj kaj ne spegulas la nunan mondon. Ne plu estas legitimeco por la vetorajto de la 5 daŭraj Ŝtatoj. UN konsistas el Ŝtatoj. Ŝtatoj estas la ĉefaj vendistoj de armiloj. Mi flegis plej ofte vundojn kaŭzitajn de minoj. Tamen kiel ministro mi provis proponi leĝon kontraŭ la eksportado de leĝeraj armiloj. En Oostende estis firmao produktanta armilojn, kies estro estis Viktor Bout⁷; li nun sidas en Tajlando en malliberejo. Foje mi renkontis lin en orienta Kongo; tiaj homoj estas ĉie en la mondo. Mi multe diskutis kun armilovendistoj. Ili diras al mi: Vi erare kredas, ke sekureco kreskos sen armiloj. Ni diras, ke sekureco kun armiloj kreskas. Perforto devas esti nur en kazo de bezono kaj tiel malforta kiel eblas, laŭ Aŭgusteno; devas esti proporcio. Vi konas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj. Ĝi estas konceptita por paca tempo. En milita tempo validas la Humana Juro laŭ la Ĝenevaj Konvencioj de 1947 kaj la Aldonaj Protokoloj de 1977. Protektado de hospitaloj, neniigo de mortigo de civitanoj, protektado de havaĵo kaj de energifontoj ktp. La Aldonaj Protokoloj estis bezonataj por trakti la enlandajn konfliktojn. Tiuj reguloj ne estas respektataj. Liberigaj movadoj uzas la civitanojn metante ilin en la mezon de la cellokoj kiel homan ŝildon. Plie multaj civitanoj suferas; mi flegis preskaŭ nur civitanojn krom en Sirio. Tie mi flegis soldatojn kaj *Al Kaida* ĉeestis por kontroli mian laboron. Fakte estas tre malfacile trovi tiun „proporcion” laŭ Aŭgusteno; ĉiam okazas kreskado de perforto. Fakte estas la uzo de kemiaĵoj kontraŭ kurdoj en Irako en 1988.

⁷ https://eo.wikipedia.org/wiki/Viktor_But

Mi kiel unua eniris tiun urbon Halabĝo (Halabja)⁸ kun kolego, ni estis nur du, ne oficiale. Ni vidis homojn, kiel oni vidas homojn en Pompejo (Pompei)⁹: la infano falis kaj mortis apud sia pilko, la virino apud sia kuirpoto, la ŝoforo falis sur sian stirradon. Estis belaj kadavroj, se oni povas diri... La gaso sarino efikas post 60 ĝis 90 sekundoj, do la sango restas kompleta, la lipoj restas ruĝaj... Mortis 7 000 homoj. Mi ankaŭ vidis vunditojn pro iverito (mustardgaso) uzita ĉi tie dum la unua mondmilito. Tiu gaso ne mortigas tuj aŭ ĝi nur vundas la okulojn, haŭton kaj mjelon. En tiu hospitalo estis vunditoj en brunaj pijamoj kaj aliaj en grizaj pijamoj. Unu grupo estis irakanoj, la aliaj estis irananoj. Sur lito ili kune ludis kartojn. Tio montras la absurdecon de militoj. Fakte tio okazas ofte, ke malamikoj paciĝas.

Unu aferon mi neniam povos akcepti ĝis mia morto, tio estas la manko je ia reago de la internacia komunumo okaze de la genocido en Ruando. Fortimigan perforton oni rajtas uzi nur por ĉesigi genocidon aŭ grandskalan lezon de Homaj Rajtoj. Tio estas aktiva senperforto. Tio ne okazis pri Ruando. Estis pluraj genocidoj en la mondo. Mi estis tiam en Ruando; kiel belgo mi devis fuĝi. Ne venis ia reago de la mondo. Mi parolis kun blukaskuloj de UN, kiuj nur devis esti tie, ne rajtis interveni. Ili rakontis, ke ili uzis la glacoviŝilojn por forviŝi la sangon sprucantan sur la aŭtoj. Fakte temis pri industria murdo per maĉetoj. Ene de monato mortis 900 000 homoj. Tion mi ne povas kompreni, 50 jarojn post la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Homo ofte estas samtempe bonkora kaj aĉa. Same mi. Homoj estas tiaj. Kelkaj asertas, ke se estus dio, dio ne kreus bonkorajn kaj aĉajn homojn... Mi estas kredanto. Kiel eblas, ke dio lasis okazi aĉegajn krimojn? Sed al kio utilis la libereco de la homo, se dio kreus nur bonkorajn homojn? Poste mi iris al kurso pri aktiva senperforto laŭ Gandhi¹⁰. En kazo de maljusteco eble perforto estas preferinda al malkuraĝa fuĝo. Tio ne samas kiel pacifismo. Ĝajnismo¹¹ malakceptas iun perforton por atingi paradizon, eĉ malakceptas mortigon de kulo. Tio inspiras min. Mi esploras pri kristanismo, budhismo kaj tiaj pripensoj. Mi elektis kristanismon, ĉar la frazo „Vi devas ami vian malamikon” estas unika. Malmultaj homoj kapablas tion; unue oni devas

⁸ https://eo.wikipedia.org/wiki/Kemia_atako_kontra%C5%AD_%C4%A4alab%C4%9Do

⁹ <https://eo.wikipedia.org/wiki/Pompejo>

¹⁰ https://eo.wikipedia.org/wiki/Mohandas_Karamchand_Gandhi

¹¹ Sesa jarcento antaŭ Kristo, <https://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%9Cajnismo>

pardoni. Poste eĉ evoluigi amon. Malfacila paŝo. Kutima situacio en konflikto estas „Maĵoro – minoro” (MM): unu nepre volas pravi, fariĝas „maĵora”. Tio ĉiam vidiĝas en la ĉiutaga vivo. Eĉ en E-o; plie ne ĉiuj parolas ĝin. Eĉ havante komunan lingvon oni povas konfliktumi. Ni devas lerni eliri el tiu MM-etoso. Pat PATFOORT el Flandrio instruas tion¹². Kial la alia pensas tiel? Oni provu transiri al la pensmaniero de la aliulo. Se iu sentas humiligon, venos konflikto, laŭ la filozofo Levinas¹³. Malfacila trejnado. Bezonatas sincera komunikado, vereco; respekto de la aliulo kaj de si mem. Kreemo, spontaneco: atenti pri korpa lingvo, rigardi la homojn en la okuloj. Uzo en persona vivo endas, tamen malfacilas. Libereco ĉiam ligiĝas al respondeco. Ekzisto ne eblas sen kontakto kun aliulo, ia kontakto. Respondeco en unua, dua kaj tria persono; unua persono: pri si mem; en dua persono: kun aliulo; en tria persono: solidareco kun nekonataj homoj. Ne ekzistas justaj militoj. Neniam plu milito. Endas transiri al nova socio. Ni devas esti optimismaj, ĉar homoj kapablas superi la malbonajn tendencojn. Vi lernis universalan lingvon, tio estas grava paŝo al tio.

Debato

Demando:

Ĉu iu vere kredas, ke la fina venko de Esperanto malebligis militon?

RM. Mi kredas ke ne. Tio ne forprenas la valoron de via agado. Mi malfacile povas imagi esperantiston, kiu komencas militon. Ekmilito ne estas nur lingva afero. La decido ne estas nur lingva.

Rimarko:

Pri ubuntu: vi parolis pri la rilato kun la aliulo, mi devas pripensi pri ubuntu.

RM. Mi dankas, ke vi menciis tion. Mi ofte renkontis tiun vorton, temas pri paca amo. Mi konas tiun vorton kaj aprezas ĝin. Temas pri serena sinteno, la socia aspekto gravas. Unu ekzisto dependas de alia.

Demando:

1993: mi organizis, ke vi povis renkonti la kontraŭulojn de la registaro de Zairo. Tio okazis en Svislando, en Caux. Ĉu vi povus informi nin pri la sekvoj de tiu rendevuo?

¹² https://it.wikipedia.org/wiki/Pat_Patfoort

¹³ https://eo.wikipedia.org/wiki/Emmanuel_Levinas

RM. En tiu vilaĝo estis grupo, kies nomo estis *Réarmement Moral* (morala rearmitaĝo). Nun ĝi havas novan nomon: *Initiatives et Changements* (iniciatoj kaj ŝanĝiĝoj). Tre ofte paco povas renaskiĝi en kaŝitaj lokoj. Ĉiukaze mi estis en Kongo kiel belga ministro, kaj tiam mi renkontis homojn el Caux. Mi povis konstati, ke tuj la etoso estis tute alispeca, elkora kaj sincera. La efiko de la diskutoj en Caux ne estis tuja, sed povas montriĝi poste, multe pli poste.

Demando:

Mi estas el Nepalo. Vi laboris en la belga registaro. Antaŭ dek jaroj Nepalo havis konflikton. Belgio vendis armilojn al la registara armeo kaj ili transiris al la kontraŭuloj. Kial vi ne povis ĉesigi tiun vendon?

RM. Mi estis en Nepalo por konferenco, mi konas la landon. Mi estis ministro dum 4 jaroj. Kiel ministro mi povis preventi konfliktojn kaj helpi al evolulandoj. Tio ne respondas al via demando. Mi supozas, ke la belgaj armiloj por Nepalo estis post mia ministra oficperiodo. La ministro pri eksteraj rilatoj devas subskribi la vendon de armiloj. Li telefonis al mi por informiĝi: kion vi opinias pri tio? Mi diris ne, same li diris ne. Ne eblis, ke en la parlamento du ministroj ne samopinias. Alia ekzemplo estis, kiam mi decidis fermi armilfirmaon. Venis demando: ĉu vi ankoraŭ apartenas al la registaro aŭ ĉu vi laboras kontraŭ la registaro? Alia ekzemplo estas, kiam mi organizis en 1998 internacian konferencon pri malarmado por daŭripova evoluo en Bruselo. Dalai Lamao¹⁴, la episkopo Desmond Tutu¹⁵, Oscar Arias, Nobel-pacpremiito¹⁶, estis invititaj, 900 NROj, 70 registaroj partoprenis. Venis persona mesaĝo de Dalai Lamao, ĉar li ne povis esti en Bruselo. La ministra konsilio volis malebligi al mi la laŭtleĝadon de la letero. Ĉinio telefonis al la registaro por malebligi tion. Mi respondis: mi emas ankoraŭ pli forte laŭtleĝi tiun dokumenton. Ĉinoj kaj Rusoj estis en la salono, ne anoncite. Miaj kolegoj minacis, dirante, ke eble la rilatoj malboniĝos inter tiuj du Ŝtatoj kaj Belgio. Kiel ministro, oni povas demisii, tamen se oni demisias, oni nenion plu povas fari, neniu aŭskultas vin plu. Tiu ekvilibro estas tre malfacila; aliflanke tia ekvilibro estis tre interesa aspekto.

¹⁴ <https://eo.wikipedia.org/wiki/Dalai-lamao>

¹⁵ https://eo.wikipedia.org/wiki/Desmond_Tutu

¹⁶ https://eo.wikipedia.org/wiki/%C3%93scar_Arias

Granda paco post grandaj militoj

de *Mireille GROSJEAN*

Mirejo prezentas sin: franclingva svisino. Ne ekzistas svisa lingvo.
Mirejo prezentas nian nunan lokon: Oostende, en la nederlandlingva belga teritorio nomata Flandrio. Ne ekzistas belga lingvo.
Ek!

Bonvole rigardu la ciferojn kaj nombrojn.

1	unu	11	dek unu
2	du	12	dek du
3	tri	20	dudek
4	kvar	21	dudek unu
5	kvin	22	dudek du
6	ses	30	tridek
7	sep	40	kvardek
8	ok	50	kvindek
9	naŭ	60	sesdek
10	dek	70	sepdek
		80	okdek
		90	naŭdek
		100	cent

Ni ne havos hodiaŭ lingvokurson.

Mi deziras prezenti al vi la nombron 80.

En la franca lingvo 80 estas *quatre-vingts*. Tio signifas kvarfoje dudek. Tiu formo devenas de la fakto, ke Gaŭloj, prauloj de francoj, nombris per manfingroj kaj piedfingroj kaj pro tio uzis la bazon dudek. La unua lernolibro, legolibro en Francio komenciĝis per „*Nos ancêtres les Gaulois*”,

niaj prauloj la Gaŭloj, kaj ĉiuj afrikaj infanoj en la kolonia tempo devis parkerigi tiun frazon kaj laŭte ripeti ĝin korse. En Senegalo, Maŭritanio, Niĝero, Ĉado, Ebur-Bordo, Togolando, Dahomejo, Kameruno, Nun ni scias, ke ni ĉiuj homaj estaĵoj, *homo sapiens*, estas pranepoj de Lucy, unua homino el Kenjo. Ni ĉiuj estas afrikdevenaj.

Mi deziras prezenti al vi la nombrojn 70 kaj 90.

En la franca lingvo en Francio oni diras *soixante-dix* kaj *quatre-vingt-dix*. En la franclingva parto de Svislando kaj la franclingva parto de Belgio aŭdiĝas *septante* kaj *nonante*. En 2011 mi instruis E-on en Burundo. En la urbo Rumonge mi aŭdis la lokan lingvon *kirundi*. Mi ne komprenas ĝin. Tamen ene de sonoj kaj silaboj mi aŭdis 23, 56.... Do mi povis konstati, ke burundanoj uzas la nombrojn en la franca. Bone, kial ne. Subite mi aŭdis *septante*. Jen mi tuj deduktis: ĉar Burundo estis mastrumata de Belgio ĝis 1960, oni uzas *septante* kaj *nonante* en tiu lando. Mi demandis miajn studentojn pri la uzo de tiuj du vortoj en Ruando kaj DR Kongo, kiuj same ligiĝis al Belgio en kolonia tempo. Ili konfirmis, ke tiu kutimo samas en tiuj du aliaj landoj. Se vi malfermas francan leksikonon kaj esploras pri *septante* kaj *nonante*, vi povos legi: formo uzata en la franclingva parto de Svislando, Romandio, kaj la franclingva parto de Belgio, Valonio. Ni konsideru, ke francparolantoj de Belgio kaj Svislando estas entute 5 milionoj, ke parolantoj de la franca lingvo en Burundo, DR Kongo kaj Ruando estas kune 80 milionoj. Ni povas konstati, kiom eŭropanoj kutimas forgesi kaj/aŭ neglekti Afrikon.

Kial damne francoj restis kaj restas ĉe *soixante-dix* kaj *quatre-vingt-dix*? Mi trovis jenan klarigon: Fine de la deknaŭa jarcento la franca registaro decidis ekuzi *septante* kaj *nonante*. Venis decido, laŭ kiu ĉiuj instruistoj devis instrui *septante* kaj *nonante*. Sed alvenis katastrofo: komenciĝis la unua mondmilito en 1914. La instruistoj iris batali. Kiuj zorgis pri la lernejoj? Emeritaj instruistoj, kiuj uzis *soixante-dix* kaj *quatre-vingt-dix*, kiel ili kutimis antaŭe! Jen vi vidas, ke ni estas en la kerno de nia temo: la granda milito ludis rolon.

Kio estas nacio? Jen difinoj:

El *reta PIV*: „*naci/o* 1 Popolo, akirinta konscion pri si mem kiel aparta socia komunumo pro komunaj karakterizaĵoj, rezultantaj de historiaj procezoj; tiuj karakterizaĵoj estas tre diversaj laŭ la kazoj (ekonomiaj interesoj, lingvo, religio, vivmaniero), sed la ĉefa estas komuna teritorio kaj emo al politika

memstareco: kutime nacio havas teritorian bazon; precipe la lingvo faras la nacion; nacio, batalanta por kreo de sia propra ŝtato; en kio konsistus la malfeliĉo, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj? Z. □ etno, gento, popolo. 2 Jura persono, konsistanta el la tuto de la individuoj regataj de unu sama konstitucio, kaj distingita disde ili: suvereneco fontas el la nacio; la interesoj de la nacio ofte kontraŭas tiujn de la individuoj. □ klaso. 3 (evi) = regno: Ligo de Nacioj; la Unuiĝintaj Nacioj.”

El reta-vortaro.de: „Memkonscia etno, iom granda popolo, konsistanta el tuto de la homoj loĝantaj en difinita teritorio kaj ligitaj per komuneco de lingvo, kutimoj, historio, tradicioj, interesoj kaj valoroj: precipe la lingvo faras la nacion; nacio batalanta por kreo de sia propra ŝtato PIV: nacio dividita inter pluraj regnoj. → gento 2. Popolo rigardata kiel suvereno. 3. (evitinde) Regno. Rim.: Tiu senco estas fremda al Esperanto, sed aperas en terminoj tradukitaj el la angla: *Unuiĝintaj Nacioj*. → lando, patrujo.”

Rimarko de Mirejo: La vorto „*nation*” ekzistas en la franca. Pri Svislando mi ne sentas ion ajn ĉe tiu vorto. Ĝi estas komplete fremda al mi. Ĝi diras al mi nenion, havas neniun guston. Ne estas svisa nacio. Svislando estas mozaiko, kiu kreskis tra sep jarcentoj kiel Eŭropa Unio kreskas. Se mi diras tion al japanoj, ili miras kaj ne komprenas.... Ni svisoj foje decidis vivi kune. Ni ne referencas al iu komuna origino. Plie: kaj Wilhelm Tell kaj Winkelried, niaj mezepokaj herooj, estis alemanoj, do ili tute ne koncernas min romandinon.

Jen interesa komento de la filozofo Nicolas Madelénat di Florio, profesoro kaj esploristo ĉe CREEADP (*Faculté de Droit et de Science Politique, Aix-en-Provence*, Francio): „Etno estas spontana formaĵo, tio estas, ke ĝi sekvas ian ordon, kiu ne apartenas al la homa volo: ĝiaj manieroj vivi kune, ĝiaj valoroj, ĝiaj reguloj evoluas laŭ la tempo laŭ la eksteraj postuloj”. „Male nacio estas politika formaĵo, kaj tio faras el ĝi ion artefaritan. Ĝi ligiĝas al ŝtato, kiu estras ĝin, modifas ĝin, decidas pri reguloj, observas la sekvadon de la reguloj kaj punas, eble eĉ per forigado, tiujn, kiuj rifuzas submeti sin”.

Unuiĝintaj Nacioj (UN) ne havas ĝustan nomon. Fakte ne nacioj kunvenas ĉe UN, sed registaroj. Do la nomo devus esti „unuiĝintaj registaroj”. En kazo de diktaturo, kompreneble la delegito en Novjorko kaj en Ĝenevo ne estas popolano sed amiko de la diktatoro... La manko je efikeco de UN venas de tio, ke la strukturo ne havas du ĉambrojn. La ĉambro de la popoloj tute mankas. La mondfederistoj kaj mondĉivitanoj postulas enkondukon de tia dua ĉambro.

Nacio estas ia homa decido. Registaro enkondukas pensmanieron tra gazetaro, instruado, enhavo de lernolibroj. Dum la faŝisma periodo en Germanio la lernantoj devis kalkuli: sciante, ke unu handikapulo kostas al la Ŝtato XY *Deutschmark*, kiom kostas 50 handikapuloj? Poste Hitler sendis handikapulojn al gaskamero. Do la Ŝtato stiras kaj gvidas la pensmanieron. Por konkrete apliki la principojn de Zamenhof kaj efektiviigi ilin fondiĝis *Sennacieca Asocio Tutmonda*, SAT, en la jaro 1921. SAT ne volas konsideri naciojn, ne volas konsideri limojn. SAT konsideras homojn kaj stimulas ideinterŝanĝojn. SAT klopodas trejni siajn membrojn al libera pensmaniero ekster la ŝablono de nacioj. Anthony Kavanagh, artisto el Kebekio: „*Les médias ne reflètent pas ce qui se passe dans le monde, mais ce qu'on veut qu'il se passe dans nos têtes*” (La amaskomunikiloj ne diras tion, kio okazas en la mondo, sed tion, kion oni volas okazigi en nia kapo.)




Dum mia instruista laboro mi ofte faris klasointerŝanĝojn inter Romandio kaj Alemanio. Tiuj kontaktoj havis ne nur la celon helpi al la lernado de la lingvo de la alia svisa etno, sed ankaŭ helpi pri la malfermo de la horizonto de la lernantoj kaj kreskigi iliajn respekton, toleremon kaj solidarecon. Ekzakte tion konkretigas Zsófia KÓRÓDY en sia laboro kun infanoj el Herzberg (DE) kaj Góra (PL). (*Ŝi elektiĝis Honora Membro de ILEI dum ĉi tiu Konferenco.*) Dum prepardiskuto kun miaj lernantoj mi diris: „Ni estas ilia romanda partnerklaso.” Lernanto diris: „Ni ne estas iuj romandoj, ni estas neŭŝateloj!!” Alia lernanto diris: „Ni ne estas iuj neŭŝateloj, ni estas el la urbo Le Locle!!” Alia lernanto diris: „Mi ne estas pure lelokano, ĉar mia patrino estas hispandevena!!” Alia diris: „Mia patro estas turkdevena!!” Kaj tiel plu... Do ĉiu volas ekzisti kiel individuo, unikaĵo. Neniu ŝatas etiketon. Ĉiu volas agnoskon pri si mem; konsekvence ĉiu devas doni tiun konsideron al ĉiuj aliaj. Ni havas nian nomŝildon kun indiko de lando. Mi ŝatus skribi tie

nur mian vilaĝon kaj Eŭropon, ĉar mi ne estas afrikanino nek azianino nek amerikanino. Ĉiu homo estas unika. Tio signifas, ke ĉiu homo estas rezulto de iu unika mikso inter gepatroj. Fakte oni povas diri, ke ĉiu homo estas mestizo. Do pureco ne ekzistas. Kelkaj dekstremuloj ŝatas paroli pri pura raso, pura etno. Tio ne ekzistas. Ni lernas: en Germanio loĝas germanoj, en Svislando estas svisoj.... Tiaj frazoj legiĝas en iuj lernolibroj kaj strukturajn menson. Tio estas iluzio. Miksiĝas la homoj tra la tuta mondo, tio estas realeco, tion oni ne povas bremsi. Diverseco regas, diverseco ĉe la plantoj, la bestoj, la kulturoj, la lingvoj. Bunteco, kiel bukedo. Rigardu ĉi tiun salonon! Jen diverseco. Sen diverseco la homaro mortus. Tio estas ege valora, tion ni devas protekti. Ni devas lerni kune vivi en reciproka respekto. Tio estas la kerno de iu pacedukado.

Ni revenu al Flandrio, la regiono, kie ni troviĝas nun. En tiu regiono oni vidas belfridojn. Temas pri turoj kun sonoriloj, sed ne temas pri preĝejaj turoj aŭ pri iu religia konstruaĵo. Dum la Mezepoko, kiam urbo liberiĝis el feŭdismo, ĝi ricevis la rajton decidi pri si mem kaj belfrido estas signo por tio.





La vorto venas el ĝermana verbo *bergen*, kiu signifas gardi, protekti, kaj *frid*, Paco, en la germana *Frieden*, en la nederlanda *vrede*. Do GARDI PACON. Nia temo kaj nia regiono plej bele harmonias. Por atingi pacon, la kunmilitintoj devas ĉion diri, priskribi, agnoski, konfesi. Nur tiel eblas konstrui novajn bazojn solidajn. Tion faris Nelson Mandela kaj Desmond Tutu [vd la *foton*] per la laboro de la Komisiono „vereco kaj pardono” (*Truth and Reconciliation Commission*). Tio estas nepra paŝo. En 2005 aperis libro pri la historio de orienta Azio dum la unua duono de la dudeka jarcento: „Historio por malfermi estontecon”. En tiu libro aperas faktoj, fotoj, kun ĉiuj fontindikoj. Tiu libro aperis en 3 versioj: unu en la ĉina lingvo, unu en la korea, unu en la japana. La enhavo estas la sama. En 2007 okazis nia Universala Kongreso en Yokohama, Japanio. Fama koreo, s-ro LEE Cheong Yeong, organizis la tradukadon al E-o. La libro aperis en E-o en 2007. [vd *foton sekvapaĝe*]

Japanoj diris al mi: temas pri tiu libro, kie ni estas la aĉuloj... Japanoj havis ĝis tiam mildigitajn informojn pri tiu terura periodo. Ili ricevis tiujn novajn faktojn kiel vangofrapon. Tamen tia malkovro estas bezono. Ne eblas konstrui pacan estontecon sen tiu agnosko. Tiaj libroj ekzistas ankaŭ pri la Historio de Eŭropo. Tamen: la japana registaro rifuzas, ke tiu libro estu oficiala lernolibro en la publikaj lernejoj, ĉar ĝi mencias du faktojn, kiujn tiu registaro rifuzas agnoski: temas pri la tragedia vivo de la koreaj konsolvirinoj uzitaj por la higieno de la japanaj soldatoj... kaj la tragika sorto de la popoloj de Okinavo, kiuj devis stari kun la soldatoj, kiel homaj ŝildoj.... Se vi volas legi tiun libron, vi devas regi la japanan, la ĉinan, la korean aŭ E-on.

Ĉar ni estas en 2015, mi ne povas NE mencii la jaron 1915 kaj la tragikajn eventojn en Armenio. La paŝo al kompleta esploro, priskribo kaj agnosko ankoraŭ mankas ĝis nun. [...] Jen afrika proverbo: dum la leonoj ne mem verkos sian Historion, verkos la Historion la ĉasistoj. Libro pri Historio aŭ Geografio ne povas esti neŭtrala. E-istoj devas flari la ŝtatajn strategiojn por gvidi la pensojn, kaj ili devas konstrui neŭtralan homan sintenon ekster tiu ŝablono. Rezisti. Ĉiu milito komenciĝas per psikologia kampanjo: „Jen nia malamiko! Ili estas malbonuloj!” Propagando. Per aktivaĵoj en pasedukado eblas fortigi reziston al tiaj politikaj paroladoj. Mi proponas al vi nun tuj ekzercon pri tio.

Ludo de la limo. Vd ĉe: <http://www.noos.ch/ideo/aktiveco.php?L=eo&A=2>

Aŭspiciitaj de

Ĉina Esperanto-Ligo

Japana Esperanto-Instituto

Korea Esperanto-Asocio

Historio por Malfermi Estontecon

Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Redaktokomitato de la Lernolibro pri
Komuna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Esperantigita de la Pacamaj Esperantistoj
en Ĉinio, Japanio kaj Koreio



Eldonita de Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2007

Post la 48-a Konferenco de ILEI

Tradicia kaj pli

Sekvante la tradician programskemon, la 48-a Konferenco en Ostendo (Oostende, Belgio, 17-25 julio 2015) aldonis kelkajn novaĵojn. Jam la unuaj konferencaj horoj de la tria vendredo de julio, kiam komencis alvenadi konferencanoj el Indonezio, Nikaragvo, Benino, Serbio, Nepalo, Urugvajo, Finnlando kaj aliaj landoj el ĉiuj kontinentoj, montris la tutmondecon de la konferenco.

Kun 170 aliĝintoj el 35 landoj, la konferenco atingis pinton de la internacia etoso jam samtage dum la interkona frandvespero. Konferencanoj el diversaj mondopartoj alportis manĝospecialaĵojn kaj trinkaĵojn el sia lando por frandigi ilin al aliaj konferencanoj kaj dume interkonatiĝi pli bone. La plej bele aranĝita estis la svisa tablo, la franca estis la plej abunda. La gustoj de Indonezio, Pollando kaj Armenio logis al iliaj tabloj, same kiel frandaĵoj el aliaj landoj. Eble la plej specifajn gustojn, almenaŭ por eŭropanoj, proponis la ĉina tablo. Kaj, por mieli ĉion, ne mankis mielkukoj kaj aliaj abelproduktoj ĉe la germana tablo. Ĉiuj kune – sufiĉe por ĉiuj, por satigi la stomakojn kaj korojn. La tipa amika etoso inter E-pedagogoj kreigis kaj daŭros la tutan semajnon, kaj multe pli.

Subteno

La konferenco estis varme akceptita kiel grava internacia evento en la turisma marurbo Ostendo. Tion konfirmis ankaŭ la urbestro Jean VANDECASTEELE bonvenigante la konferencanojn dum la solena malfermo de la konferenco en la Urbodomo, sabaton 2015-08-18.

Krom la kutimaj inaŭguraj paroladoj kaj salutvortoj, ILEI aparte omaĝis sian multjaran estraranon kaj eksprezidanton Edward SYMOENS, kies vivo kaj E-laboro estis forte ligitaj al okcidenta Flandrio kaj Oostende, kaj kies 12-jara pranepino, Nette WAGNER, plibeligis la inaŭguron per saksofona interludo.

Omaĝe al alia forpasinta prezidanto de ILEI, Maŭro La Torre, estis proklamita la unua gajninto de la *Premio Maŭro La Torre*, d-ro Davide ASTORI. La premion aljuĝas kunlabore la familio La Torre kaj ILEI ĉiun duan jaron. [vd paĝon 26.]



De maldekstre: Mirejo Grosjean (prez. ILEI), Radojica Petrović (respondeculo pri konferencoj), Margaretha Symoens (LKK-ano), Stefan MacGill (vic-prez. de UEA), Marc Cuffez (Prez. LKK), s-ro Jean Vandecasteele (urbestro de Ostendo), Kristin Tygat kaj Flory Witdoeckt (LKK-anoj) (Foto de Mónika Molnár)

Post la komuna fotado [vd. *la dorsan kovrilon*], la solenaĵo daŭris per bonveniga koktelo regale de la Urbodomo al la konferencanoj. Anstataŭ la tradicia *Nacia vespero*, okazis *Nacia posttagmezo* sur la urbocentra placo, titolita *Centro-festo: Mondaj lingvoj kaj koloroj*. Kaj la e-istaj konferencanoj kaj la loka neesperantista publiko ĝuis plurhoran programon, financitan el la urba buĝeto, kiun prezentis la *Fanfaro de la Fervojo*, Baletlernejo *Rose d'Ivry* kaj la Multkultura Koruso MATONDO. Asocioj de fremddevenaj loĝantoj de la urbo el Azio, Afriko kaj Latinameriko prezentis sin per propraj lingvoj kaj skriboj kun traduko en la nederlandan kaj Esperanton. Per apartaj budoj prezentiĝis La Verdaj Skoltoj, perloj el Charleroi, vitraj juveloj el Hungario, manĝaĵoj el Nepalo.

La oficiala urbestrara subteno materialigis ankaŭ tra monsubteno por dumkonferenca loĝado de 15 esperantistoj el ekstereŭropaj landoj, ĉefe junuloj. Aliajn restadkostojn kaj vojaĝkostojn por ili pagis parte ILEI per siaj fondusoj *Afriko* kaj *Interkulturo*, parte TEJO, sed plejparte pluraj e-istoj el Belgio, Francio, Germanio, Finnlando, Italio kaj Kanado, kiuj ankaŭ donis garantiojn necesajn por vizoj. Tio plifortigis la sentojn de esperantista

solidareco kaj la etoson de tutmondeco kaj plijuniĝo de la konferenco, kies plej juna partoprenanto estis Elvira, trijara knabino el Danio. Sian kontenton pri tia konferenco aparte esprimis POÓR Veronika, la estonta ĝenerala direktoro de UEA, kaj LEE Jungkee, la estrarano de UEA, per jenaj mesaĝoj al la estrarano pri konferencoj:

Mi aŭdis multajn laŭdojn pri la ILEI-Konferenco, kaj la brilantaj okuloj de junuloj, kiuj ĵus venis de tie, konfirmis la laŭdojn. Gratulojn ke vi organizis tian konferencon! (POÓR Veronika)

Mi kore dankas vin pro la bonega aranĝo por la 48-a ILEI-Konferenco sub via gvido. Kun ĝojo kaj kontento mi revenis al Koreio. Estis ĝojige, ke en la konferenco sufiĉe multaj azianoj aliĝis. Mi antaŭvidas, ke en la 49-a Konferenco en Nyíregyháza, Hungario, pli da azianoj partoprenos. (LEE Jungkee)

La kleriga programo

Post la inaŭgura sabato, la konferencaj dimanĉo kaj lundo estis plenaj je kunsidoj kaj prelegoj. Komenciĝis la instruista trejnado, kiun fakte instigis Dana Esperanto-Asocio ricevinte subvencion de Erasmus+ por instruista trejnado. Krom kvar stipendiitoj el Danio, komence partoprenis ankoraŭ kvardeko da aliaj konferencanoj. Fine, atestilon ricevis 25 partoprenintoj kiuj ĉeestis ĉiujn prelegojn kaj ekzercojn de Mireille GROSJEAN, Duncan CHARTERS, Katalin KOVÁTS, Zsófia KÓRÓDY, Elisabeth LE DRU kaj Radojica PETROVIĆ. Ĉi tiu trejnado aldoniĝas en la serion de dumkonferencaj instrutrejnadaj seminarioj, kiaj okazis en Matanzas, 2010, kaj Herzberg - Sieber, 2013, k.c. La granda intereso, kiun ĝi vekis kaj la postaj pritaksoj eksplicite starigas la postulon, ke la serio daŭru ĉiujare dum la sekvontaj konferencoj kun pli da atento pri antaŭpreparoj kaj praktikaj aspektoj de la trejnado.

Paralele okazis, nove en ILEI-konferencoj, kurso por deko da diverslandaj komencantoj gvidata de Ron GLOSSOP, Aurora BUTE kaj Bharat GHIMIRE. Ĝiaj populareco kaj sukceso indikas, ke ĝi fariĝu regula konferenca programero motivanta konferencanojn kungvidi grupojn de komencantoj kaj tiel enkonduki ilin en la E-komunumon. Aliflanke, la tradician ekspresan kurseton de loka lingvo, ĉi-foje *Nederlanda eksprese*, realigis Kristin TYTGAT. Dudeko da aliaj prelegoj traktis buntan temaron, ekde sanprizorgo,

abelproduktoj kaj armenaj haĉkaroj¹⁷, ĝis E-eldonado, stilfiguroj en E-literaturo, instruspertoj el diversaj mondopartoj, komputilaj resursoj kaj ilaro por lernado de Esperanto kaj historia evoluo de rus-ukrainaj interrilatoj, ĉiam kun sufiĉa nombro da interesatoj, kiuj kelkfoje plendis pro neevitebla samtempeco de du aŭ tri prelegoj kiuj interesis ilin.

Simpozio

La konferenca ĉeftemo *Grandan pacon post grandaj militoj* estis elektita okaze de la centa datreveno de la komenco de la *Granda milito* kaj 70-a datreveno de la fino de la Dua mondmilito. Konekse kun la ĉeftemo kaj kun la flandra programo *Neniam plu milito*, la tradicia ILEI-simpozio dum la du lastaj konferencaj tagoj, lerte gvidata de Kristin TYTGAT, traktis la temon *Lingva justeco kaj paco: kiuj defioj por la nuna mondo?* tra dek prelegoj, ĉiuj en Esperanto krom unu en la franca kun postsekva tradukado en E-on.

En la enkonduka prelego *La rolo de lingvo en konflikto* Kristin TYTGAT observis la lingvon en du aspektoj - identeco kaj politiko. La ĉefpreleganto (francalingva kun E-traduko de K. Tytgat) Réginald MOREELS (belga kirurgo, antaŭa prezidanto de *Kuracistoj sen limoj* kaj belga eksministro pri Internacia Kunlaboro) serĉis respondon pri *Ĉu milito povas esti justa?* referencante siajn spertojn el siaj kuracistaj kaj diplomaciaj misioj en landoj en milito kaj en teritorioj trafitaj de naturkatastrofoj. [vd p. 4-11.]

Ekstersimpozie, paralele kun ĝiaj malfermo kaj enkonduka prelego, prelegis alia elstara neesperantista gasto, profesoro Herman LODIEWYCKS, prezidanto de Internacia Asocio de Profesoroj de Filozofio, kiu substrekis la gravan taskon de Unesko por enkonduki la filozofian dimension en la ĝeneralan instruadon pro ĝia graveco por la formado de konscioj.

En la simpozia prelego *Eritreo: lingvoj, politiko kaj religio en historie kompleksa konflikto* Duncan CHARTERS prezentis la konsiderojn kaj konkludojn de esplorado pri la kompleksa kaj tragedia lingva kaj socia situacio en Eritreo, kiun li gvidis kun siaj studentoj en kurso pri Terglobaj Perspektivoj. Aliajn aspektojn de lingva diverseco traktis kaj Mireille GROSJEAN (*Duidiomismo en Afriko*) kaj Heidi GOES (*Kvanteca kaj spaca analizaj studoj de mikro-variado en la konga lingvaro*).

¹⁷ riĉe gravuritaj kruc-steleoj tipaj por la tradicia armena skulptoarto

Pri lingvaj politikoj en aliaj mondopartoj, respektive Latinameriko, Barato kaj Ĉinio, okupiĝis Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ (*Lingva diverseco en Ameriko: alproksimiĝo al la lingvaj politikoj*), A. Giridhar RAO (*La falsa promeso de la angla en Barato: edukado kaj socia justeco*) kaj HUANG Yinbao „Trezoro” (*Lingvoj en dialogo inter Ĉinio kaj la mondo. Ĉu E-o havas ŝancon en Ĉinio?*).

Bengt-Arne WICKSTRÖM analizis la ekonomian aspekton de lingvaj rajtoj, komparante la valoron de rajto kaj ĝiaj kostoj (*Lingvaj rajtoj: Efikeco, justeco, realigo*) kaj Hiroyuki USUI meditis pri la utopia revo, ke la paco eblas en la mondo de militmaŝinoj kaj iliaj posedantoj, kaj ke E-o, servante al lingva justeco, povas servi al konstruado de alternativa mondo sen milito (*Regreso en utopion – ĉu postmoderna valoro de Esperanto?*).

Lingva festivalo

La riĉeco de la lingva kaj kultura fono de la konferenca partoprenantaro estis montrita en la tradicia lingva festivalo (mardon, 21 julio), en kiu estis prezentitaj 25 lingvoj. La konferencanoj povis ekzerci japanan kaligrafion, skribi sian nomon per ĉinaj ideogramoj, kanti en la dana, konatiĝi kun fonetikaj principoj de la korea skribsistemo, sperti diferencojn inter la brita kaj usona angla, kompreni kiel funkcias lingvoj sen verbaj formoj por pasinteco kaj estonteco (ekz. la tetuna en Orienta Timoro kaj la sunda en Indonezio), konatiĝi kun la piĝina lingvo Tok Pisin (Papuo-Novgvineo) kaj kun diversaj skribsistemoj (armena, ideogramaj, cirilaj, la tradicia sunda, devanagario), lerni kiel prezenti sin kaj kalkuli en la afrikaj lingvoj Joruba kaj Lingala kaj en pluraj aliaj ekstereŭropaj kaj eŭropaj lingvoj.

Kunsidoj kaj laborgrupoj

La Komitato de ILEI kunsidis en tri sesioj, faris siajn rutinaĵojn, senŝarĝigis la malnovan kaj elektis novan sepkapan Estraron kun kvar malnovaj kaj tri novaj estraranoj por la periodo 2015 - 2018.

La Estraro kunsidis ĉiuvespere kun LKK por analizi la tagon kaj plani la morgaŭon. La novelektita Estraro kunsidis tuj post la elekto por interkonsenti taskodividon inter la ĉeestantaj estraranoj kaj provizore plani laboron por ne tre longa venanta periodo.

Tri laborgrupoj okupiĝis pri taksado de aktuale disponeblaj E-lerniloj gvidate de Katalin KOVÁTS, konferenca rezolucio kaj kunlaboro inter ILEI kaj TEJO, aktuala kaj estonta, precipe por IJK kaj ILEI-konferenco.

Dum la ferma plenkunsido vendredon posttagmeze, 24 julio, Enikő ZENGŐ SEREGHY prezentis la urbon Nyíregyháza, Hungario, kiu gastigos la venontan, 49-an konferencon de ILEI, poste konferencanoj aprobis per aplaŭdo la konferencan rezolucion, kaj la reelektita prezidantino Mireille GROSJEAN resumis la konferencajn rezultojn, prezentis la novajn estraranojn kaj per modestaj donacoj dankis al LKK-anoj pro ilia sindona laboro.

Turisma kaj distra programo

Sub la slogano *Renkontoj kun la historio, pensoj pri la paco*, konforma al la konferenca ĉeftemo, 5 duontagaj kaj 3 tuttagaj ekskursoj gvidis konferencanojn al historiaj okazejoj en okcidenta Flandrio el la du mondmilitoj kaj al vidindaĵoj de Bruĝo, Antverpeno kaj Bruselo, inkluzive de kelkhoraj promenoj tra la konferencurbo mem kaj la proksima Raversijde kun la fama *Atlantika Muro* - germana defendsistemo el la Dua mondmilito.

La distraj *Eŭropa* kaj *Internacia vesperoj* donis podion al konferencanoj por prezenti kulturerojn el siaj landoj amuzante la konferencan publikon, kiu akceptis ilin kun entuziasmo.

Dum la *Konferenca bankedo* en la proksima restoracio *Benny Flory WITDOECKT* kantis en Esperanto kaj nacilingve ĉiam ŝatatajn kantojn el diversaj periodoj de la pasinta jarcento. Samvespere en la konferencujo, por nebankedemuloj, Ilia DEWI prezentis *Indonezian vesperon* kaj Rob MOERBEEK *Literaturan vesperon*.

Por la *Adiaŭa vespero* (vendredo, 24. julio), en la stilo "fino la farajon ornamas", tutvespera koncerto de Mikaelo BRONŝTEJN venis kiel kremo sur la torto.

Loĝistiko

Konferencajn bezonaĵojn, dumkonferencan deĵoradon kaj gvidadon de la ekskursoj prizorgis LKK kun Marc CUFFEZ kiel prezidanto kaj kasisto, kiu ankaŭ prizorgis la bankedon kaj kelkajn ekskursojn, Flory WITDOECKT kiel vicprezidanto (loĝado, kelkaj ekskursoj, *Nacia posttagmezo*), membroj Kristin TYTGAT (simpozio) kaj Margaretha SYMOENS (dumkonferenca

deĵorado kaj administrado), kunlaborantoj Katja LÖDÖR kaj Hans DELNAT (emblemo, afiŝoj, kuponoj, nomŝildoj) kaj ankoraŭ kelkaj dumkonferencaj volontuloj.

FEL instalis libroservon kun abundo da propraj eldonaĵoj, al kiuj aldoniĝis publikaĵoj de kelkaj konferencanoj dezirantaj prezenti sian eldonan aktivadon. Dum la lastaj du tagoj estis instalita pupekspozicio „Fabelaj mondoj” de Anna Striganova kaj prezentita la eldonejo *Impeto* (Dmitrij – „Dima” ŜEVĈENKO). La konferencejo organizita laŭ la stilo „ĉio sub unu tegmento”, kun la akceptejoj, libroservo, konferencaj salonoj, loĝado kaj manĝado en la renovigita junulargastejo *De Ploate (Plateso)*, rezervita tiusemajne nur por ILEI, minimumigis la konferencajn kostojn kaj kotizojn, kaj favoris la intiman konferencan etoson kun multa tempo disponebla por novaj amikiĝoj kaj refreŝigo de la malnovaj.

Kaj plu

Kelkaj plibonigcelaj kritikoj el Ostendo povas esti utilaj kaj devas esti konsiderataj por venontaj konferencoj. Ekzemple: la detala taga programo estis konata nur vespere por la morgaŭa tago. Senkulpigo kaj klarigo kial devis esti tiel, ne helpas al konferencano plani sian konferencan tempon, do necesas organizi la preparojn kaj planadon tiel, ke la konferenca programo estu detala kaj fiksita por ĉiuj tagoj antaŭ la komenco de la konferenco.

Alia rimarko rilatis al la labora parto de la programo: mankis laborgrupoj kaj diskutrondoj pri gravaj temoj el la vivo de ILEI. La Estraro atentis pri tio por estontaj konferencoj, sed ankaŭ aliaj aktivuloj estas invitataj proponi kaj gvidi tiajn programerojn.

La junuloj, kies partopreno kaj kontribuo estis aparte rimarkebla en Ostendo, bezonas pli da spaco kaj tempo por junulara programo, kiun ili mem pretas organizi precipe dum la noktaj horoj. Nun TEJO kaj ILEI diskutas ne nur pri tio, sed pli vaste: pri pliriĉigo de la programa kontribuo de ILEI en IJK kaj reciproke de TEJO ĉe ILEI. La pozitivaj spertoj kun la kurso por komentantoj kaj la granda bezono de instruista trejnado indikas direktojn de plua pliriĉigo de la kleriga programo inkluzive de renovigo de la iam populara ILEI-gimnazio, aŭ progresigaj kursoj, aŭ E-lingvaj kursoj en diversaj fakoj de klerigado kaj kunlaboraj aktivaĵoj kun AIS kaj ISAE, sed tio jam estas temoj por apartaj konsideroj.

Radojica PETROVIĈ, Estrarano pri Konferencoj

Nia eks-prezidanto Mauro La Torre

Li naskiĝis en 1946 kaj mortis en 2010 en la aĝo de 63 jaroj. Tiu elstara italo gvidis la Ligon de 1998 ĝis 2003. Li estas Honora Membro de la Ligo. La familio La Torre decidis honori lin per Premio kaj kune kun ILEI lanĉis Premion Mauro La Torre. La unuan Premion gajnis en julio 2015 D-ro Davide Astori el Italio (tute hazarde italo ricevas italdevenan premion) pro sia komparo inter la du tradukoj al E-o de la verko de Collodi „Pinokjo”. La anonco pri la Premio kaj la gajninto okazis dum la malferma ceremonio de la 48-a ILEI-Konferenco en Oostende kaj la transdono okazis solene komence de la Tago de Lernado dum UK en Lillo. Se vi volas kandidatiĝi por tiu Premio, preparu vin! La regularo aperas en la paĝaro www.ilei.info ĉe agado – projektoj.



De maldekstre: *Margherita d'Onofrio, vidvino de Mauro La Torre, Davide Astori, premiito, Renato Corsetti, Mireille Grosjean, Laura La Torre, filino de Mauro La Torre.* (Foto de Marija Belošević.)

*Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI*

AMO 'Ege(re)' progresas

Ok seminarioj en 2014, nun naŭ en 2015. La sekva estos AMO 15 en Kulturcentro Greziljono (25-31 okt) kun la titolo 'Grimpi la monton granitan'. Novembre okazos AMO 16 en Havano, Kubo, kaj la ĵus decidita AMO 17 okazos kadre de la Junulara Esperanto-Semajno (JES) en la hungara vinurbo Eger inter la 28a kaj 30a de decembro, kun la temo 'Junigi la komunumon'. Ni agnoskos la valoron agi ĉe homoj de la Tria Aĝo, sed UEA devas urĝe trovi manierojn ekhavi pli ekvilibrantan aĝdistribuon ĉe sia membraro. Artikolo pri tio aperos en la novembra revuo *Esperanto*.

UEA anoncos stipendiojn por junuloj aŭ junulgvidantoj el la Sud-Orienta Regiono de Eŭropo (projekto SORE) ĉar tiu regiono havas generaciajn defiojn. En tiu seminario ni ĉerpos el la spertoj de landoj kun junularaj sekcioj aŭ agado (Hungario, Pollando, Ukrainio k.a.)

Por AMO en 2016 firmiĝas planoj en Slovakio januare pri turismo, Brazilo januarfine en Manaus - do Amazonio -, Nepalo februarfine kaj eble Bandung en Indonezio, kie okazos trilanda kongreso kune kun Nov-Zelando kaj Aŭstralio. Pro kontaktoj en la UK ni havas jam 13 proponojn aŭ interesiĝojn por la sekva jaro. Feliĉe progresas planoj por nova AMO-administranto. Do en 2016 AMO riskas eg-ege progresi.

Stefan MACGILL

UEA kaj Kapabligo – rekomendoj kaj rimedoj – finfine kunigitaj

Komitata Forumo dum la Tago de Kapabligo okaze de UK faris resume la sekvajn rekomendojn, kiujn akceptis la plena Komitato de UEA – plenajn tekstojn vi legos en la retejo de UEA, ĉe *TEKO > Komitataj dokumentoj*.

1. Aktivula Maturigo

UEA trovu administrajn fortojn por la AMO-programo; kreu pli adekvatan retvizaĝon por la projekto, kiu kapablu prezenti rezultojn el seminarioj; okazigu en 2016 la unuan seminarion kiu celas trejni trejnistojn kaj evoluigu retajn trejneblojn.

2. Kunlaboro pri edukado/instruado

UEA starigu pli fortajn partnerajn rilatojn kun ILEI, edukado.net, lernu.net, TEJO kaj la ekzamenaj instancoj; frontu la defion kiel altiri al la komunumo kursfinintojn el la novaj retkursoj, evoluigu kursojn allogajn por junaj personoj kaj bonigu la kondiĉojn por memlernado de pli aĝaj personoj.

3. Sekurigo de rimedoj

UEA kreskigu la financon bazon por kapabligaj agadoj preter la nunaj buĝetaj rimedoj. Pri 2016, la Estraro de UEA detalis siajn planojn pri Movada Evoluigo, listigante unuopajn projektojn aŭ kampojn kun difinitaj monsumoj. Tion la komitato akceptis. Unue la sumo por Movada Evoluigo estis kreskigita je ĉ. 30% tra la lastaj du buĝetperiodoj kaj por 2016 sumas je €25 000, el kiu Kapabligo ricevis signifan parton, i.a. ĉar ĝi plej unue kaj plej orde prezentis siajn proponojn. Kompare, interkrampe la ciferoj el 2015 kaj 2014 resp. post tiu por 2016.

Kapabligo: € 8 300 (7 000, 4 000)

ILEI – disponigo: € 3 000 (3 000, 3 000)

RITE, UAM, plurlingvaj informiloj, eldona agado, vojaĝigo de instruistoj...

Aktivula Maturigo: € 4 400 (3 000, 3 000)

€ 3 000 Por mildigi kostojn por ses ĝis ok seminarioj tra 2016.

€ 1 000 Starigo kaj honorariado de laborgrupo por kreskigi la programon kaj vidigi rezultojn.

€ 400 Kostoj por starigo de la sekva ŝtupo (SuperAMO):
trejnado de trejnistoj.

Kapabligo ĉe UEA: € 900 (1 000, 1 000)

Kovros erojn, kiujn ILEI ne financos, i.a. aliĝkotizo al ALTE
(Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo).

Stefan MACGILL

Brila skipo parolis al atentema publiko

de Mireille GROSJEAN

La partoprenantoj de la Kolokvo sekvis unue la prezenton de d-rino Iлона KOUTNY pri universitata instruado de esperantologio kaj formado de instruisto. Ŝi gvidas la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn (IS) en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM, Poznan, PL), kiuj proponas ankaŭ unujaran instruistan trejnadon. Temas pri la metodika specialiĝo de parto de la studentoj, kiuj sekvas la trijaran IS (kaj ricevas diplomon de UAM), al kiu aldoniĝas aliaj personoj, kiuj volas sekvi nur la lertigadon pri instruado (ili ricevas diplomon de ILEI).

Poste parolis d-rino Katalin KOVÁTS el Hago, NL, la konata prizorganto de



la same konata paĝaro *edukado.net* kaj organizanto de la KER ekzamenoj [vd *la foton*]. Ŝi faris prezenton kun multaj statistikaj elementoj pri tiu ŝtate agnoskita ekzamensistemo. Ŝi prezentis sian retejon sed ne nur; ŝi plie listigis la atingojn kaj bezonojn en la kampo de Instruista Trejnado (IT). Metodoj kaj lerniloj abundas, tamen lertigado kaj diplomado mageras. Jen precize la celo de tia kolokvo: analizo kaj prezento de la nuna situacio kaj de la estonteco.

Sekvis prezentoj de lerniloj de Stano MARČEK el Martin, SK, kaj Zlatko TIŠLJAR, SL. Pedagogion prezentis Mónika MOLNÁR, el La Chaux-du-Milieu, CH, kaj precizan pedagogian vojon, tiun de Célestin FREINET, kiun ŝi aplikas en la lernejo *La Granda Ursino* en La Chaux-de-Fonds.

Okazis diversaj prezentoj en rilato kun la lernhelpa aŭ lernfaciliga efiko de Esperanto. Zsófia KÓRÓDY el Herzberg am Harz, DE, parolis pri la kontakto inter junuloj kadre de urboĝemeligo Germanio-Pollando, dum kiuj la sociaj

kaj edukaj aspektoj same forte gravas kiel la uzo de komuna lingvo, Esperanto kaj progreso en tiu uzo. Se iu parolas pri eklernado de E-o tuj ni pensas pri la paĝaro *lernu.net*. La organizantoj rilatis kun Petro BALÁŽ, SK, sed lia ĉeesto ne eblis. Tamen venis prezento kun faktoj, observoj kaj ciferoj, preciza analizo de la evoluo de tiu nemalhavebla retejo. Same okazis kun la brita programo „*Springboard to Languages*” de d-rino Angela TELLIER. Ŝia prezento estis laŭtelegata al la publiko de la Kolokvo. Iel iom konklude Mireille GROSJEAN el Les Brenets, CH, prezidanto de ILEI, listigis la diversajn alirojn al la temo „lernhelpa efiko” substrekante, ke tiu konstato jam estis klare menciita en la resumo de la Unua Tutmonda Kolokvo (*Conférence*) en 1922 en Ĝenevo, CH.

Pri lingvopolitiko parolis István ERTL, el LU, kiu laboras en instanco de Eŭropa Unio kaj prezentis la funkciadon kaj problemojn de la lingva aspekto de tiu institucio. Lingvopolitiko estis ankaŭ la temo de Márta KOVÁCS el Budapeŝto, HU, la lando, kie eblas elekti E-on kadre de abituro; plie la ŝtatan lingvoekzamenon postulitan por la akiro de universitata diplomo eblas trapasi ankaŭ pri E-o. Ĉiuj scias, kiom komplika estas la lingva situacio de Svislando; multaj povis ekscii, kiom viglaj estas nuntempe la diskutoj pri fremdlingvoinstruado en Svislando. Dietrich WEIDMANN el Uster, CH,



prezentis tiun lingvopolitikan situacion kaj pledis por pli efika edukado al plurlingvismo.

← *La tri interpretistoj (de maldekstre): Istvan ERTL, Cyrille HURSTEL, Adrian TANNER.*

La lasta posttagmezo en Neuchâtel celis reliefigi la laboron de ILEI kaj de estoj ĝenerale en rilato kun la jarmilaj celoj de UNESKO. D-ro Duncan CHARTERS el Elsah, IL, Usono, prezentis la celojn kaj skizis la ligojn al nia lingvo kaj ties institucioj. Monique ARNAUD el Gap, FR, esprimis sin pri la verkado de „Rakonto pri tarofolio”, komuna verko de afrika grupo okaze de la ILEI-Konferenco en Porto Novo en 2008. Mireille GROSJEAN priskribis la koncepton de triaksa kurso ĵus organizita en Kotonuo, Benino, kun lertigado de virinoj en gvidaj roloj, enkonduko al legado kaj skribado de la fonua lingvo kaj unua kontakto kun monda lingvo Esperanto.

La lasta tago de la kolokvo okazis en La Chaux-de-Fonds en la urba

biblioteko. S-ro Claude GACOND, la arkivisto de CDELI, *Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia*, kiu situas en la urba biblioteko, akceptis la partoprenantojn kaj montris al ili la lokojn kaj aktivajojn de tiu valora kolekto. Paralele kaj en grupoj okazis diskutoj pri la agado de ILEI kaj ebla evoluo de la instruado de E-o.

La kolokvo estis kunveno de altnivelaj fakuloj kaj grupo de instruistoj kaj interesatoj; konatiĝo eblis, ideointerŝanĝoj okazis. Publiko venis el la regiono kaj povis sekvi la prelegojn kaj debatojn danke al samtempa interpretado de tri profesuloj. Gazetara laboro bone efikis. Informado el la Respubliko kaj Kantono Neuchâtel iris al 160 Ŝtatoj tra iliaj ambasadejoj en Svislando; iris al ili tra la tuta jaro pliaj informoj pri la Kolokvo en retmesaĝoj; sed okaze de la Kolokvo mankis diplomatoj (unu ĉeestis); ni nun scias, kiom la ŝtataj instancoj interesiĝas pri E-o. El tio ni povas konsciigi, ke nia laboro por disvastigi E-on devas esti multe pli forta kaj vigla.

Paĝo por tiuj el ni, kiuj loĝas en EŬROPO

Verŝajne ekzistas ankaŭ ekster Eŭropo tiaj asocioj de instruistoj, kun kiuj Germain Pirlot (el Belgio) instigas nin ekrileti:

Ni provu ekrileti kaj iel kunlabori kun ne-esperantistaj samfakuloj por interŝanĝoj de informoj kaj spertoj, sed neniel kun la celo esperantigi ilin; tio estus stultega!

Mi ĉefe pensas pri AEDE (*Association Européenne Des Enseignants* / Eŭropa Asocio de Instruistoj), kiu havas sekciojn en pluraj eŭropaj landoj. Por pli da detaloj vidu ĉe:

– <http://www.aede.eu/site/>

– <http://www.aede.eu/site/index.php/aede-sections>

Mi iĝis AEDE-membro kaj atenteme informis pri uzo de Esperanto dum lernejoj aktivaj kadre de la eŭropa projekto *Erasmus +*.

Por pli da informoj pri ĝi, vidu jenan paĝaron en 24 lingvoj:

http://ec.europa.eu/programmes/erasmus-plus/index_fr.htm



Verŝajne vi jam scias, ke en la ILEI-Konferenco en Oostende partoprenis 4 danoj kun subvencio de tiu eŭropa programo. Sekve de tia informado la estraro de la belga AEDE-EL-sekcio petis, ke mi verku artikolon pri E-o por la bulteno de la sekcio. Je la komenco de 2015 ĝi estis publikigita; eblas legi ĝin ĉe:

<http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-2015-03.pdf> (p. 4-12).

La 17-an de julio mi mallonge informis la belgan sekcion pri la malfermo de la ILEI-konferenco en Oostende kaj, jam la saman tagon, la ĉefredaktisto petis, ke mi verku mallongan raporton por la venonta bulteno.

Pluras ja diversaj manieroj por kunlabori kun ne-e-istaj medioj samfakaj, ni nur provu uzi tiujn eblojn. Sed, por ekrikti kun tiaj medioj, ekzemple kun AEDE, **nepras**:

- **iĝi** AEDE-ano (pli facilas informi „de interne” ol „de ekstere”);
- **esti** profesie instruisto;
- **informi** laŭokaze, kiam temas pri instruado kaj Eŭropo kun uzado de Esperanto. Mencii faktojn. Paroli racie.

Neniam la celo estu altrudi Esperanton; okaze de demandoj, ne troe respondi kaj mencii interesajn retpaĝarojn, ekz. *esperanto.net* kaj *lernu.net*.

Antaŭdankon pro eventualaj rimarkoj kaj komentoj.

Kore via, Germain PIRLOT

E-fakrondo en la politeknika lernejo, Subotica, Serbio

Kiel allogi gejunulojn al Esperanto? Tiu demando jam longe estas aktuala en nia E-societo, kaj ne nur en ĝi. Dum la lastaj jaroj ni ne povis sukcese varbi kaj reteni la gejunulojn en niaj E-movadaj agoj, kvankam ni provis en pluraj mezlernejoj. La interesiĝo ofte estis malgranda kaj mallongdaŭra.

Mi laboras en faka mezlernejo *Politehnička škola* (Politeknika Lernejo) kiel instruistino de informatiko. En la lerneja jaro 2014/2015 ni la unuan fojon enkondukis E-on – kiel fakrondon. Tiun ĉi novan ideon kaj motivadon donis al mi du renkontiĝoj, kiujn mi antaŭe partoprenis: la AMO-1, seminario de UEA, en Horány, Hungario, kaj la Eŭropa E-Kongreso en Rijeka, Kroatio.

Mi multe pensadis pri tio, kiamaniere allogi kaj teni junulojn, ke tio ne estu troa ŝarĝo, malfacilaĵo por ili. Mi intencis proponi la eblon libere elekteblan kaj facile akireblan por la gelernantoj, el kiuj multaj loĝas en aliaj urboj,

vojaĝas ĉiutage, kaj krome ili jam havas 7-8 instruhorojn tage. Pro tio mi planis organizi fakrondon, anstataŭ kurson. La ĉefa celo estis informado pri E-o kaj veko de interesiĝo, ĉar ofte la unua reago de lernantoj (kaj ankaŭ de miaj kolegoj) estis „Kio estas Esperanto?”.

En aŭgusto 2014 mi ricevis subtenon de Iso PLANIĆ, la lerneja direktoro, por plani fakrondon, kiu komencis funkcii post informaj prelegoj pri E-o. La 26-an de septembro, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, la hungaran kaj serban prelegojn pri E-o partoprenis entute 15 lernantoj. La fakrondo komenciĝis fine de novembro, kiam aperis nur 3 gelernantoj. Tiu nombro poste iomete plialtiĝis. Estis ankoraŭ interesiĝantoj, sed mi ne povis ĉiam trovi komunan taŭgan tempopunkton por kunigi la aliĝintojn de la 1-a ĝis la 4-a klasoj. La informativan prelegon mi ripetis hungare en februaro. Entute pli ol 30 gelernantoj vizitis almenaŭ unu fojon tiujn prelegojn aŭ la instruhorojn en la fakrondo. Inter 5 kaj 10 gelernantoj vizitis plurfoje la fakrondon, kiu okazis unufoje semajne kaj daŭris 45 minutojn.

Mi ĉefe uzis la instrumaterialon de Anna LÖWENSTEIN laŭ la rekta metodo, kaj kreis retan Moodle-kurson por sekvi la lecionojn el la hejmo. Mi planis uzi ankaŭ la materialon de la zagreba metodo, sed tio estas prokrastita al la sekva lernoĵaro. La gelernantoj estis informitaj pri aliaj retaj ebloj por lerni la lingvon, kaj ankaŭ pri la aktivajoj de la urba E-societo, ekzemple, kelkaj el ili ĉeestis la Zamenhof-tagan feston en decembro.

Parto de la informado pri Esperanto estis ankaŭ la fakto, ke la E-societo „Tibor Sekelj“ en Subotica organizis KER-ekzamensesion en la Politeknika Lernejo kadre de la 4-a Tutmonda Ekzamentago. La 30-an de majo 2015 tiun ekzamensesion partoprenis 10 kandidatoj el 3 landoj (Slovenio, Bulgario kaj Serbio) je la niveloj B1, B2 kaj C1, parte (skribe aŭ parole), aŭ komplekse. La ĉefa organizanto estis Katalin KOVÁTS, estro de la Ekzamen-komisiono de UEA, la loka organizanto estis mi, kaj ekzamenis ankaŭ Stefan MACGILL, vicprezidanto de UEA. La parola parto de la ekzameno okazis rete, pere de la programo *Google Hangout*.

La membroj de la fakrondo helpis prepari la ekzamensalonojn, koridorojn, pentris portreton kaj karikaturon de Zamenhof kaj kun entute 4 aktoroj ni filmis du esperantlingvajn skeĉojn. La aranĝon forte subtenis la estraro de la lernejo, kaj entuziasme helpis ankaŭ gelernantoj (ne nur membroj de la fakrondo) kaj neesperantistaj gekolegoj. Kelkaj el ili eĉ ĉeestis la posttagmezan Amikan Kunvenon, kiu sekvis la ekzamenon.



Partoprenantoj de la KER-ekzamentago en Subotica

Estas grave mencii, ke la estraro disponigis la tutan lernejon (la ekzameno okazis en 3 paralelaj ejoj), trinkaĵon, teknikan helpanton por la parola parto. La vicdirektorino Gyöngyi ARANCSITY DANCSA deĵoris dum la ekzamenoj kaj ĉeestis la kultur-artan programon. Neesperantista helpanto estis ankaŭ Viktorija ŠIMON VULETIĆ, direktorino de la kinejo *Lifka Art* Subotica.

En la lerneja gazeto, kiu eldoniĝas 2-foje jare, en junio aperis dulingva artikolo pri E-o kaj pri la KER-ekzameno (hungare kaj serbe), kaj en julio ankoraŭ 2 artikoloj en lokaj gazetoj. Krome okazis entute ĉirkaŭ unuhora ekstermovada komuniko – pere de 1 loka radio- kaj 3 televidstacioj – pri E-o, pri la ekzameno kaj pri la fakrondo. Katalin KOVÁTS helpas disvastigi tiujn materialojn, sed kontribuas ankaŭ la ekzamenatoj, precipe Anton MIHELIC el Slovenio. Tiamaniere la ekzamentago, kun partoprenantoj entute el 5 landoj, reklamas ne nur la Politeknikan Lernejon en la ekster- kaj enmovada mondo, sed ankaŭ la internacian lingvon.

Mi enketis la gelernantojn, kiuj vizitadis la fakrondon, pri iliaj motivoj, impresoj kaj atendoj. La plimulto de ili la unuan fojon aŭdis pri E-o en nia lernejo. Ili ĉiuj opinias, ke E-o estas interesa, utila kaj volonte lernus ĝin, sed ankaŭ korespondus kaj partoprenus en internaciaj lernejoj projektoj.



La plej diligentaj fakrondanoj kun ilia instruistino.

Mi deziras daŭrigi kaj disvolvi tiun lernejan aktivadon, laŭ la sekvaj planoj: enkonduko de diversstipaj lernometodoj (ekz. ludoj, *Juna Amiko*, E-muziko kaj kantoj), kontakto de eksterlandaj junulaj grupoj kaj partopreno en internaciaj projektoj.

Laŭ mia opinio la E-fakrondo atingis sian celon: informadon pri E-o. Dum tiu lernojaro oni multe parolis pri E-o en ĉi tiu lernejo (ne nur en la fakrondo), sed pli vaste. Formiĝis grupeto de gejunuloj, kiuj ekde septembro deziras daŭrigi la lernadon de la internacia lingvo. Se rigardi la atingitan lingvokonon, la rezultoj ne estas tiom impresaj, precipe pro sekvaj malfavoraj kondiĉoj: lernantoj de malsama aĝo (15-18 jaroj), kiuj ofte vizitadas malsamajn klasojn (la 5 plej diligentaj apartenas al 4 diversaj klasoj) en du skipoj (antaŭ- kaj posttagmeza) kun tre malsamaj horaroj kaj libera tempo, kaj ankaŭ malsamaj lingvokapabloj. Malgraŭ tio ekzistas ambaŭflanka entuziasmo.

Ĉiuj konsiloj kaj komentoj estas bonvenaj!

*Aranka LASLO, sekretariino de la E-societo „Tibor Sekelj” Subotica,
<laslo.az@gmail.com>*

Raporto pri la „Projekto Stelo”, realigita ĉe la elementa lernejo „Centro Educacional Eurípedes Barsanulfo” (BR)

Dum tri monatoj gelernantoj el la elementa lernejo *Centro Educacional Eurípedes Barsanulfo*, Brazilo, partoprenis E-an projekton nomatan „Stelo”. La nomo referencas al la iam ekzistinta Esperanto-mono. La celo de la projekto estis premii la partoprenantojn laŭ iuj kriterioj. Ĉiu lernanto ricevis ian monbileton, sur kiun la instruisto stampis la emblemon de la projekto kaj notis ĉiufoje la nombron de la akiritaj *steloj*. Por ricevi premion, necesis kolekti minimume dudek *stelojn*. La lernanto akirinta la plej multajn *stelojn* en sia klaso ricevos aldonan premion.



La gelernantoj mem proponis, kiuj taskoj devus esti plenumataj kaj kiom da *steloj* ili valoru. Ekzemple, propagandi E-on ĉe sociaj retejoj valoris du *stelojn*. Tamen, la propagandinto ricevus *stelojn* nur en la okazo, kiam li sendis al la instruisto foton, por pruvi la faron (ekz. foton de la poŝtelefona ekrano). Interalie ili devus plenumi jenajn taskojn: *kunhavi la lernolibron de E-o*; *donaci propran, akiritan stelon al iu alia lernanto*; *kunporti en la klasĉambbron alilandan objekton, kuriozaĵon*; *plenumi eksterlernejan (E-an)*

Konsulino de la belga konsulejo en Beijing eklernas Esperanton

Kutime, kiam oni petas vizon al Eŭropo, iu oficisto de la konsulejo ŝatas telefoni por ion demandi, ĝenerale en la ĉina lingvo. Aprile, kiam mi poŝte petis vizon al la belga konsulejo en Beijing, mi ricevis tiun telefonalkvokon de iu virino kun orelplaĉa voĉo, ŝi nur demandis min „kial vi bezonas dufojan eniron en Belgio?”. Ŝi parolis ĉine tute kvazaŭ ĉinino. Mi kaj mia filino estas la unuaj vizpetantoj el la 20 aliĝintoj de la ILEI-konferenco. Ĉio iris glate, ĉar mi sufiĉe bone preparis la dokumentojn, kaj la konsulejo tuj konsentis kaj donis al ni 30-tagan vizon.

La sekvan tagon la dokumentoj de S-ro LI Lianzhong el nordorienta Ĉinio atingis la konsulejon. Tiu virino telefonis ankaŭ al li kaj demandis ĉine: „Por kio vi vizitos Belgion?”. La sinjoro respondis, ke li iros tien por partopreni Esperanto-konferencon.

„Kio estas Esperanto?” la konsulino tuj demandis scivoleme. S-ro LI tuj prezentis nian karan lingvon al ŝi.

„Do, kie oni povas lerni la lingvon?”

„Oni povas lerni Esperanton en Interreto.”

Post tio laŭ peto de la konsulino s-ro LI instruis al ŝi kelkajn vortojn kiel jes, ne, dankon, ĝis revido.

S-ro LI sentis ŝian gajan humoron el la alia flanko de la telefono. Verŝajne la konsulino ege kontentis pri tiu ĉi babilado. Do, lia vizpeto tuj estis kontentigita kaj li akiris vizon de 15 tagoj al Eŭropo.

20 tagoj pasis. Post kiam aliaj 4 aliĝintoj de la ILEI-konferenco sendis siajn dokumentojn al la belga konsulejo en Beijing, neatendite, ili ricevis telefonvokon, ne ĉine, ne france, sed en Esperanto!

La konsulino Esperante demandis al ili „kio estas via nomo? kial vi iros al Belgio? ...” La unua bone parolas Esperanton, do, ne estis problemo. La konsulino tre ĝojis kaj diris al ŝi, ke ŝi nomiĝas Jenny, ŝi ĵus eklernis E-on.

Sed bedaŭrinde alia vizpetantino estas komencanto, ŝi ne bone komprenis kaj ne sciis kiel respondi. La konsulino malĝojis, dirante ĉine: „Vi eĉ ne kapablas paroli Esperanton, kial kaj kiel vi partoprenos E-konferencon?” Poste la

konsulino telefonis al la oficejo de la mezlernejo, kie nia samideanino laboras, demandante, ĉu vere ŝi iam lernis Esperanton. La oficejestro jesis.

Nia samideanino ege timis, ke la konsulejo rifuzos ŝian vizopeton. Ŝi turnis sin al mi kaj demandis min, kion fari. Kion fari? Ankaŭ mi ne sciis. Kiu povis antaŭvidi, ke la konsulino parolas Esperanton!

La 1-an de junio mi ricevis telefonavokon de S-ino Sanoza, kiu loĝas en la sama urbo kiel mi. Ŝi sufiĉe longe preparis siajn dokumentojn kaj sufiĉe longe atendis la rezulton de la decido de la konsulejo, kaj finfine informiĝis, ke la pasportoj de ŝi kaj de ŝia nepino jam estas survoje. Babilante, ŝi diris al mi, ke ankaŭ ŝi ricevis E-telefonavokon de la belga konsulejo. Ŝi tuj respondis ankaŭ en Esperanto, dume, Sanoza ne kaptis unu frazon de la konsulino, dirante: „Mi ne komprenas vin”. Aŭdinte tion, la konsulino tuj ŝanĝis la lingvon kaj daŭrigis la demandojn en la ĉina lingvo.

GONG Xiaofeng (Arko)

La 49-a konferenco de ILEI, 30 julio - 6 aŭg. 2016

En la betulurbo pri aktualaj evoluvojoj de lernado

La unua nomparto de la venonta konferencurbo de ILEI, Nyíregyháza en Hungario [vd la urban blazonon *sekvapaĝe*], signifas *betulo* (*Nyír*) kaj ĝi estis unuafoje skribita kiel urbonomo en la jaro 1209. Ĝi simbole asociiĝas kun la konferenca temo:

Novaj vojoj de lernado

Kiel la arbo, kiu plej frue folias post la vintro, la betulo en tradiciaj kulturoj de slavoj kaj keltoj havas simbolan signifon de printempo, renoviĝo, kresko kaj adaptiĝemo. La lernado, siaflanke, akompanas unue la printempon de homa vivo, la kreskon de infano en plenaĝulon kaj tutvivan kreskigon de la kapablo adaptiĝi al la vivmedio per la bezonataj scioj kaj lertoj.

Novaj vojoj de lernado en la moderna pedagogio signifas ne nur novajn lern-teknologiojn kaj instrurimedojn, sed unuavice novan aliron al la lernado kaj instruado kaj ŝanĝitajn rolojn de la lernanto kaj la instruanto en la lernprocezo. Estas tasko de ILEI sekvi tiun evoluon por progresigi la

pedagogion de Esperanto konforme al siaj Statuto kaj rolo en la Strategia laborplano de UEA. La Altlernejo de Nyíregyháza (*Nyíregyházi Főiskola*) kun sia Filologia fakultato estas bona loko por diskutoj pri tiu temo.

Ĉi tiu teksto estas alvoko al ĉiuj agantoj de ILEI proponi programerojn kaj kontribui al sukceso de la konferenco. Skribu al la estrarano pri konferencoj se:

- Vi havas E-pedagogiajn kaj ILEI-organizajn demandojn por dumkonferenca traktado en Nyíregyháza;
- Vi mem pretas gvidi diskutrondon aŭ laborgrupon, aŭ prelegi pri certa temo;
- Vi povas partoprenigi al la konferenco grupon de komencantoj aŭ progresantoj por adekvata E-kurso;
- Vi interesiĝas pri E-instruista trejnado;
- Vi mem pretas instrui en E-kurso aŭ porinstruista trejnseminario;
- Vi havas alian deziron aŭ programproponon.



Viaj fruaj reagoj al ĉi tiu alvoko helpas fruan skizon kaj postan konkretigon de la konferenca programo. Anticipan dankon! Dume LKK preparas ĉion necesan por lanĉi la aliĝilon kaj mendilon de konferencaj servoj. Tion vi ricevos tra la retpaĝoj kaj aliaj komunikkanaloj de ILEI kaj per la sekvonta numero de IPR.

Bonvenon en Nyíregyháza la 30-an de julio 2016.

*Estrarano pri konferencoj, Radojica PETROVIĆ
<radojica.petrovic.rs@gmail.com>*

ILEI-FEST: Elano sen sekvo

La intenco estis lanĉi duan semajnon en 2016: ne nur la kutiman ILEI-Konferencon, sed plian renkontiĝon kun la nomo *ILEI-Festivalo de*

Esperantaj kulturo kaj pedagogio en Bjelovar, Kroatio. Tion ni jam anoncis en niaj antaŭaj eldonoj. Bedaŭrinde la komencaj laboroj kun kroataj kolegoj estis malfacilaj kaj finfine la estraro decidis rezigni pri tiu evento en 2016. La ideo restas alloga kaj eble konkretiĝos iam en la estonto.

Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj [en revizio]

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Monique Arnaud, Synnöve Myntinnen.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.

Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyeester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kazo de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 11-an de septembro 2015,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2015.**



Malfermo de la 48-a Konferenco. De maldekstre: Ariadna Garcia Gutierrez (TEJO), Stefan MacGill (UEA), Jean Vandecasteele (la urbestro), Mireille Grosjean (ILEI), Kristin Tytgat (LKK), Marc Cuffez (LKK). Fotis Monika Molnár.



Grupa foto de la konferencanoj antaŭ la urbodomo post la malfermo de la Konferenco. Fotis loka profesiulo por gazeto.

